

## **1920-12-09-sergeant-fousek\_1**

Kara samideano,

Mi ĵus ricevas vian leteron de la 3-a de tiu monato kaj multe dankas vin. Mi ankaŭ atendas leterojn nepacience. Dankon por via longa artikolo de s-ro Durieux. Vi vere estas tre afabla kopii tion ĉion por mi. Mi bone konas s-ron Durieux kaj estis kun li en WasserKirsch antaŭ lia foriro al Praha. Li ne plu vivas en Silte sed en centra Francujo. Dankon ankoraŭ por la alia parto de via letero kiu estas pli interesa ol iu de Durieux ĉar ĝi estas vi kaj ne skribado de alia.

Mia edzo pli bone fartas nun, feliĉe, li suferis pli ol unu monato kaj estis tiel kuraĝa ĉar li iris treniĝante al la Tribunalalo ĉiu matene kaj ofte posttagmeze.

Li certe bone fartus se li povus malpli labori sed li havas tro da aferoj kaj sekretario ne povas vere helpi lin ĉar estas laboro de mema iniciativo.

Kiam advokato devas dividi sian laboron en 3 partojn:

10 pledoj en la Tribunalalo dum 5an kaj? horoj, 20 la ricevo de la klientoj, 30 la leteroj kaj skriba parto, paperoj, kiel ni nomas „la kuirajo“ – li ne povas trovi tempon por amuzoj – Vi ne povas imagi la paperaron, la dokumentaron kiu ekzistas por unu sola homo.

Mi faris multe sed kiel estas guto da akvo en la maro. Plie, mi estis kaj estas malsana

## **1920-12-09-sergeant-fousek\_2**

kaj tial ne povas helpi lin. Mi faris tro de post unu monato kaj mi vivis per miaj nervoj, do, virino kun mia nervema temperamento, ne forta, devas pagi kaj la lastan lundon mi kuŝiĝis febra, nun mi leviĝas sed nenion povas fari ol resti etendita.

En 15 tagoj mi havis 4 servistinojn hejme kaj purigistojn. Dum 4 tagoj mi restis sola. Mia edzo malsana kaj mia filo kuŝata dum kelkaj tagoj kun febroj kaj malvarmumo.

Mia domo estas granda, kvazaŭ 5 etaĝoj kun la teretaĝo kaj la subteretaĝo kie estas la forno/la hejtparato.

Mi kiu neniam devus laciĝi fizike ne povis ekzisti tiel. Do, vidu, rezultaton. Unu servistino ŝtelis kaj ni trovis multajn tolaĵojn en ŝia lito. Ni ne plendis leĝe (ĉar estas iom malfacile por advokato kiu tiel ofte defendas ŝtelistojn, procesi por li mem, tiale).

Alia, tre bona, venis sed restis nur unu tago pro ŝia surdeco. Ŝi ne aŭdis la sonorilojn. Tie kie oni sonorilas la tutan tago, ne estis eble gardi ŝin. Nun, mi havas sufiĉe bona kaj povas esti iom trandila kun ŝi kaj kun alia bona purigistino kaj knabo kiel servisto k.t.p.

Mi estas ĉiam turmentantino por mi mem. Mi ne bone trovas la vorton. Sed pro tiu turmentiĝo mi ofte estas malsana.

Tiu folio estas pli bone por via edzino ĉar aferoj de servistoj ne interesos vin. Do, donu ĝui al ŝi. Mi hontas vidante viajn P.M. por mia filo

### 1920-12-09-sergeant-fousek\_3

ĉar mi ne trovis tempon ŝerci kelkajn por via edzino. Senkulpigu min, ĉu vi bonvolas? Mi petas vin.

Denove, mia edzo pledos en la Cour d'Assises mardon

Malbonan afero kiun li malŝatas. Mi ne devas diri li defendas ĉar li atakos (kio estas tre malagrabla).

Virino mortigas homon kies vidvino volas venĝi lin. Do ŝi petis mian edzon „se porter partie civile“ kaj li devas pledi por ataki la mortigintinon por ke ŝi ne estu senkulpigata. Vi certe komprenos min kvankam mi ne trovas bonajn vortojn.

Morgaŭ, li pledas por vendisto da „nongat“ kiun oni diras estas Turkano kaj al kiu oni faras malfacilaĵojn ĉar Turkio estas nia malamiko. Li tute ne estas Turkano. Li donis al mi multajn sukeraĵojn ĉiu foje (2foje po jaro) kiam li venas por vendi en la Boulogna foiro.

Nun, mi tute komprenas „Bohémreris kaj Bohéme“.

Estas malkomprenaĵo mia pri tgegane kaj tchéque.

Ĉiam la Bohemujo estis (kaj ankoraŭ pli nun) tre tre simpatia al ni. Eĉ dum la milito ni ĉiam diris „Kiel domaĝo ke ili devas batali kontraŭ ni“ Via lando estas bela lando kaj viaj samlandanoj tre tre edukataj.

Certege, mi ridis multe pri la dika virino sur la fotografaĵo sed mi ne kuraĝis diri kiom al vi ĉar mi timis ke eble estus parencino via aŭ konatulino

### 1920-12-09-sergeant-fousek\_4

sed miajn la ĝojon de mia filo vidante ŝin. Precipe, ke ni Francoj, malfeliĉe eble, estas tre malfacile plaĉataj pri la beleco virina. Ni rimarkas ĉiujn detalojn kaj ni amas la modon, le „chic“. La belon, Nature, mi parolas pri mezklasoj. La laboristoj kaj la kampanaroj ne atentis pri tio. Kvankam juna laboristino franca ĉiam scias sin vestigi tre bone eĉ se ŝi ne havas riĉajn vestaĵojn.

Dankon por la monŝanga tabelo. Ĝi estas sama kiel tiu kiun mi sendis al vi. Mi komprenas tre bone kiel mi pensis ke vi eraris. Pro la monŝanĝo mi ne povas viziti Svisujon. Mi tre bona konas la tutan Svisujon.

Mi kuŝiĝis unu nokton, sur la supraĵo de Gorvergrat antaŭ la Matterhorn, venante de Zermatt. La aero estas tiel malmulta, malofta ke mi ne povis moviĝi aŭ marŝi, mi suferis tiel kiel en la koro.

Ĉu via amiko, advokato, kiu suferis pri reŭmatismo deziras korespondadi Esperante? Ĉu li estis en tiu banloko speciale por kuraradi sian reŭmatismon?

Ĉu tio estas efika al li?

Ĉu vi facile havas karbon en via urbo? Eble vi uzas lignaĵon? Vi bezonas sendube multe da varmo se la vetero estas tiel malvarma. Estas ĉiam frostoj ĉe vi? Kaj vi ne havas malsekajn klimatojn sendube

## 1920-12-09-sergeant-fousek\_5

Tie dum Dec.&Nov. ofte, oftege pluvas & estas griza sen suna vetero. Kiel malsimileco kun „Nice“. Ĉu vi konas „la Riviera on“? Kiel mi ŝatas tiun landon? Mi nur eliris 3foje en semajnoj kaj mi enuas pri la kara maro. Tie estas ĉiam interesaĵo kiun oni povas vidi. La urbo (krom la malnova urbo kun ĝiaj ..... kaj kastelo) ne interesigas sed la maro!!! Ĝi estas ĉiam malsimila & estas ŝipoj, ŝipegoj kiuj trapasas aŭ eniras. La fiŝkaptista popolo tute ne estas sama al la alia popolo. Tre brua, tre movema, tre religia (rom.katolika) – ne delikataj. Ili havas hispanan sangon, kaj estas tre brunaj. La Hispanoj restis tie kiam ili venos en Nederlandon & .... Jen la rezulto sur la .....

Estas ankoraŭ rumaĵoj de la kampo de Napoleon kiam li volis supreniri en Anglujon . Boulogne estas malnova urbo & havas interesplenan historion.

Mi ankaŭ senda al Vi & Via edzino miajn plej sincerajn bondezirojn por